

**Asocio de la Verduloj Esperantistaj, AVE 2023-11**  
kunlaboranta fakasocio de UEA pri ekologio.  
Parolas la internacian, neŭtralan lingvon Esperanto

### Estontaj renkontiĝoj de AVE-anoj:

2024-07/08, Arusha, Kunveno je UK - kiu aktivos ?

### Okazis inter aliaj:

2023-08-01, 15:15 Torino, Kunveno je UK  
2023-06 Incheon (KR), KEA & AVE ĉe movada foiro de Tutmondaj Verduloj: [globalgreens.org](http://globalgreens.org)  
2023-05-26.. AVE ĉe Germana Eo-Kongreso  
2022-06-03/06 Oldenburg (Old.) okaze de Germana & Nederlanda Eo-Kongresoj; gvid. vizito de marĉo.  
2021 / 2022 virtuala UK, Belfast - Montreal  
2021-05-21/24 virtuale Frankfurt & Slubice, okaze de Germana & Pola Esperanto-Kongresoj.  
2021 AVE ĉe virtuala konsilio de European Greens.  
2019-07-20 Lahti (FI), UK, kunveno de AVE  
2019-07-11 BET, Panevezys (LT): prelego pri plastajhoj & akvaroj  
2018-05-19 Antverpeno, konsilio de la Europaj Verdaj Partioj. AVE-informtablo je movada foiro  
2017-03-30/04-02 Liverpool (GB), teamo de AVE ĉe la Tutmonda Kongreso de Verdaj Partioj: pri lingva justeco ene de la Verduloj: [greens2017.org](http://greens2017.org)  
2015-07-27 Lille, Francio, publika AVE-kunsido okaze de la 100-a UK de UEA; temoj: Agendo 21 & Daŭropovo en la Esperanto-Movado.

**Niaj Celoj:** La Asocio de Verduloj Esperantistaj estas malgranda Ne-Registara Organizaĵo; ni estas nura reto da homoj, neformala asocio. AVE-anoj parolas Esperanton kaj estas Verduloj (membroj aŭ simpatiantoj de Verdaj Partioj) favoras ekologian, socialan, pacan kaj viv-subtenan politikon. AVE pensas pri la tuta mondo; niaj membroj agas surloke. Ni celas informi niajn geamikojn en politiko kaj en Civil-Sociaj Organizaĵoj (au NRO-oj) pri la avantaĝoj de Esperanto kaj ni informas niajn esperantistajn geamikojn pri la neceso de Verda Politiko.

**Historio de AVE:** AVE estis fondita 1984 en Liège (Belgio) okaze de la unua renkontiĝo de la Eŭropaj Verdaj Partioj, jen : [verduloj.org/0\\_17/aveno\\_00.pdf](http://verduloj.org/0_17/aveno_00.pdf)

**Kunlaboro:** AVE kunlaboras kun UEA, SAT & diversaj Civil-Sociaj Organizaĵoj kaj kun la Verdaj Partioj de landa, kontinenta kaj globala nivelo.

**Agado:** Ĉar AVE vivas de la ligo inter la membroj, ni ŝatas ricevi de vi informojn, rilate al verda politiko en via lando por publikigi ilin en Aveno, nia bulteno. Ni tradukas gravajn tekstojn el/de/por la Verdaj Partioj kaj Verda Movado. Ĝi servas por reciproka informo. Temoj: Ekologio, Sociala Justeco, Homaj & Bestaj Rajtoj, nemilita konflikt-solvado: Bedaŭrinde la rusa prezidento preferis realigi sian deziron per milito; akaparis Krimeon kaj agresis Ukrainon. Ni subtenas la agresitan landon rehavi siajn limojn de 1994 !

### Per-Esperanto-Agado:

UN lanĉis la 17 Celojn de Daŭrigebla Evoluo ĝis

2030 (CDE/ sustainable development goals, SDG). AVE sekvas ilin rilate edukadon, daŭripovon, rearbarigon - ĉi-kaze ni kunlaboras kun esperantistoj en pluraj landoj kaj subtenas iliajn evoluajn projektojn, ekzemple: "Mazingira Salama/Ketare" de Mramba Simba en nord-okcidenta Tanzanio; "Akvo por Kalima" kaj subteni samideanajn gestudentojn kune kun SBV, Goma, DR Kongo, informoj: [www.verduloj.org/afriko.htm](http://www.verduloj.org/afriko.htm)  
: Infanĝardeno kaj agroforsa ĝardeno en Rumonge

Ni subtenas per informado kaj tradukado la **Verdajn Partiojn tutmonde:** Deklaracio de Liverpool 2017 Ĉarto de la Tutmondaj Verduloj, 2012 (Dakar), <http://www.globalgreens.org/charter>  
Kaj kunlaboras kun kelkaj landaj partioj, ekzemple en Francio : [verduloj.org/welcome.htm#Verduloj](http://verduloj.org/welcome.htm#Verduloj)  
Civila Krizo- kaj Konflikt-Solvado (2 p.), Programo de la Eŭropa Verda Partio, 2006; Manifestoj de 2009 kaj 2014, Verdula Libro, Verda Frakcio de Europa Parlamento, 2004 - 2009.

: **Tradukas** gravajn tekstojn de **Ekologia Movado**  
: 100 Bonaj Argumentoj kontraŭ la Atomenergio.  
: Plastaĵoj en la akvaroj & kemiaĵoj en la plastaĵoj.  
[verduloj.org/dokument.htm](http://verduloj.org/dokument.htm)

Por **membriĝi** al AVE vi ne bezonas esti membro de iu Verda / Verdula / Ekologia Partio, sed akcepti niajn Celojn. AVE havas ĉ. 300 membrojn. Bonvolu informi nin se vi aktivus (pli aŭ malpli) en iu ajn NRO/CSO aŭ Verda Partio. Bonvolu membriĝi en Verda Partio de via lando je: [globalgreens.org/member-parties/](http://globalgreens.org/member-parties/)

**Nia semajna bulteno:** [verduloj.org/aveno.htm](http://verduloj.org/aveno.htm)

**Kotizo:** Nia jara kotizo estas 10 EUR, (esceptoj eblas) Plia donaco por nia evoluo-subtena agado bonvenas. Por UEA-membroj: nia Konto „**avex-z**“ Bonvolu mencii vian nomon kaj kion vi subtenas. Se vi ne estas membro de UEA bonvolu pagi al mia persona konto ĉe Volksbank Freiburg:  
IBAN: DE31 6809 0000 0007 8681 11  
BIC/SWIFT: GENODE61FR1

**AVE-sekretario:** Mi invitas vin elkore, partopreni en nia agado kaj informi niajn ne-esperantistajn geamikojn en ekologio-socialaj (verdaj) partioj aŭ NRO/CSO-oj pri Esperanto.

Adreso: AVE  
c/o Dr. Manfred Westermayer  
Weissdornweg 68  
DE-53177 Bonn  
[manfred@westermayer.de](mailto:manfred@westermayer.de)  
Retejoj:

ĉefe arkiva: [verduloj.org](http://verduloj.org)  
nova: [verdularo.com](http://verdularo.com)



**AVE - la ligo inter Verduloj kaj Esperantistoj**  
**Ni pensas tutmonde &**  
**agag surloke kaj regione**